Junularo Esperantista Brita invitas vin al Esperanto-renkontiĝo en Bath, urbo konata pro ĝia bela arkitekturo kaj kulturaj heredaĵoj! La renkontiĝo okazos de la 11an ĝis la 13an de Novembro kaj inkluzivos urbogvidadon, komunan manĝadon, kaj kongreseton.

Ni volas adapti la renkontiĝon laŭ VIAJ voloj kaj bezonoj, do en la aliĝilo ne hezitu meti viajn dezirojn kaj proponojn! Aliĝu ĉi tie:
https://goo.gl/forms/1lHuw2HK8VsfLgCS2

Reklamvideo estas ĉi tie: https://youtu.be/OP7yKM8NqXo

**Loĝado**
Estas tri gastejoj kiuj situas sufiĉe proksime al la urbocentro:
YMCA Bath
ĉ. £25 nokte
http://reservations.bookhostels.com/bathymca.co.uk/

St Christopher's Inn Bath
ĉ. £30 nokte
https://www.st-christophers.co.uk/bath-hostels

Bath Backpackers
ĉ. £18 nokte
http://www.hostels.co.uk/bookHostel.php

**Kiel alveni**
Bath troviĝas apud Bristolo en sudokcidenta anglio:




Trajne ĝi estas alirebla de London Paddington aŭ London Waterloo. Indas mendi biletojn *almenaŭ* 2 semajnojn antaŭ ol vojaĝi, preferinde eĉ pli. Britaj trajnbiletoj povas ege multe kosti! Indas mendi de National Rail por trovi la plej bonan prezon:
[http://www.nationalrail.co.uk/](http://www.nationalrail.co.uk/)

Buse eblas iri de London Victoria Busstacidomo per National Express. La biletoj ankaŭ tre kostiĝas, do mendu prefere frue:
[http://www.nationalexpress.com/home.aspx](http://www.nationalexpress.com/home.aspx)

Se vi flugas de eksterlande, kontrolu flugbiletojn ankaŭ al la Bristola Flughaveno. Kutime ili pli kostas ol la Londonaj, sed dependas. De Bristolo estas rekta trajno al Bath kiu daŭras proksimume 10 minutojn, ankaŭ mendeblan ĉe National Rail.

**Programo:**
**<u>Vendredo</u>**
**Drinkejumado ĉe The King of Wessex, 18:00**

Jam estas tradicio ĉe JEB rekontiĝoj, ke oni almenaŭ unufoje iras al Wetherspoons, granda pabĉeno en Britio. Ĉi tie vi povas babili, manĝi, drinki, kiel ajn vi volas.

**<u>Sabato</u>**

**Urbogvidado, 10:00 - 12:00**

Ariel gvidos vin tra la urbo, kaj prezentos diversajn vidindaĵojn: la abatejon, la Circus, la Royal Crescent, kaj tiel plu.

La renkontiĝejo por ekiri estos apud la trajnstacidomo, kie estas granda pavimita areo kun multaj restoracioj.

**Kongreseto ĉe Percy Centre, 12:30 - 17:00**

Por la kongreseto ni petas viajn kontribuojn - ĉu prelegon, diskutrondon, atelieron, artaĵon - kunportu kaj kundividu viajn konojn kaj interesaĵojn kun la grupo.

Dum la kongreseto ankaŭ okazos la jarkunsido de JEB.

**Vespermanĝo ĉe Indian Temptation, 18:00**

Indian Temptation estas barata vegetara restoracio. Tie ni havos la komunan vespermanĝon, kaj post la manĝo, ni povas resti kaj ludi tabloludojn.

La menuon vi povas rigardi ĉe http://www.indiantemptation.com/menus/

**Drinkejumado ĉe The Raven, 21:00**

The Raven estas pabo kun hejmeca etoso, kie ni povas babili, drinki, kaj ludi tabloludojn. Se homoj emas iri aliloken, aŭ multaj ne volas drinki, ni povas tamen iri al alia loko.

**<u>Dimanĉo</u>**

**Ekskurso al la Romiaj Banejoj, 10:00 - 12:00**

La Romiaj Banejoj (Roman Baths) donas al la urbo ĝian nomon. La romianoj trovis varmajn akvofontojn sub la tero kaj konstruis banejojn.

Dum jarcentoj poste oni vizitis la urbon por profiti de la supozeble kuracajn akvojn. Hodiaŭ ĝi estas nur muzeo, sed ĝi estas tre interesa kaj donas interesan perspektivon pri romia historio.

Se vi aĝas inter 18 kaj 30, vi rajtas ricevi rabaton je kvin pundoj por la enirbileto.

Eksciu pli ĉe la retejo: http://www.romanbaths.co.uk/

**Tagmanĝo ĉe The Oven Picejo, 12:00**
The Oven estas picejo kun pluraj vegetaraj kaj veganaj opcioj. Tie ni renkontiĝos por manĝi kune, kaj diri adiaŭ al unu la alia. Ne estos planita programo por la cetero de la tago, tamen se restos homoj, ni povas almenaŭ festi iom pli longe!

Eksciu pli ĉe http://www.theovenpizzeria.co.uk/

**La programon vi povas elŝuti en formato ICAL ĉi tie:**
**https://calendar.google.com/calendar/ical/t700m48003sqmo8bonkfd22r00%40group.calendar.google.com/public/basic.ics**

**Guglo-mapon kun pingloj por ĉiuj la lokoj, al kiuj ni iros dum la renkontiĝo, vi povas trovi ĉi tie:**
**https://drive.google.com/open?id=1ufM0QB2m4hxYca6KA8dGMkUcXwl&usp=sharing**